

André Cherpillod Etimologia vortaro

Für jeden, der sich für Sprachen interessiert, stellt sich hin und wieder die Frage: Woher kommt das Wort? Das gilt ganz besonders für die Eigennamen. Wer zum Beispiel den Ursprung des Vornamen „Alfredo“ wissen will, kann im soeben erschienenen *Etimologia vortaro de la propraj nomoj* von André Cherpillod nachschlagen. Dort steht zu lesen, dass der Name aus den germanischen Wörtern „adal“ und „frid“ zusammengesetzt ist. In Esperanto bedeuten diese „nobela“ und „paco“. Nicht berücksichtigt wird die Tatsache, dass die Bestandteile „Adal“ und „Fried“ in anderen Namen wie „Adalbert“ beziehungsweise „Alfried“ vorkommen und dass es für „Alfred“ auch die Erklärung „Alf-red“ (= Rat der Elfen) gibt. Anfang und Ende nimmt das von UEA verlegte und auch dort erhältliche Buch in der Schweiz: Zwischen *Aaro* (Svisa rivero) und *Zuriko* (Zürich) finden sich auf 227 Seiten noch weitere 4311 Eigennamen mit Herkunftserklärung und Schreibweisen in verschiedenen Sprachen.

Das Werk eignet sich für den Sprachinteressierten, der mehrere Sprachen spricht und nach Verbindungen sucht – und zum Nachschlagen der Schreibweise von Eigennamen. *Nobela Paco*

Stefan Maul El verva vivo ĵurnalista

En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de *Monato*, internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo. Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalista, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de *Monato*. Stefan Maul, *El verva vivo ĵurnalista*, FEL, 2005. 272 p.

Abeleto nova gazeto en Aŭgsburgo

En Aŭgsburgo aperis nova esperantlingva gazeto *Abeleto*. La eldonanto (*Yenovk Lazian, Leonhard-Hausmannstr.58, 86157 Augsburg*) prezentis ĝin en decembro 2005 en Munkeno. *red.*

69 kursoj en 24 landoj

Oficiale organizataj Esperanto-kursoj en universitatoj kaj altinstitutoj (3a nivelo) fine de januaro 2006:

Nombro laŭlande : Austrio: 1 - Belgio: 1 - Brazilo: 4 - Bulgario: 1 - Ĉeĥio: 1 - Ĉinio: 18 - Germanio: 5 - Hispanio: 2 - Hungario: 2 - Israelo: 1 - Italio: 1 - Japanio: 6 - Korea Respubliko: 3 - Kostariko: 2 - Kubo: 1 - Litovio: 2 - Meksiko: 1 - Nederlando: 1 - Pollando: 3 - Rusio: 5 - Svedio: 2 - Usono: 4 - Uzbekio: 1 - Venezuelo: 1

Sume: 69 kursoj en 24 landoj.

Verŝajne estas aliaj, kiuj ne estas menciitaj en mia listo. ... Ĝenerale mi mencias sciigojn ricevitajn de la instrugvidantoj mem.

Se tiu listo (21-paĝa) interesas vin, mi volonte sendos ĝin al vi kiel aldonitaĵo al retmesaĝo. Vi rajtas uzi ĝin laŭplaĉe. Tamen, se ĝi aperas en paĝaro, mi deziras ricevi la adreson de tiu ejo. Ĉiam bonvenos sciigoj pri kursoj, kiuj ne estus menciitaj en tiu januara listo, ĉar mi klopodas daŭre ĝisdatigi ĝin.

G. Pirlot *gepir.apro@pandora.be*

159 libroj en 2005

159 libroj eldonitaj en 2005 estas la plej magra rezulto en la lastaj kvin jaroj, ankaŭ la suma paĝokvanto (23 780 paĝoj), sed la sperto diras ke tio ape-naŭ estas signo de malfortiĝo de la esperantista eldonado, kaj ke post unu jaro ambaŭ nombroj kreskos. En 2005 plej multajn titolojn eldonis Edition Iltis – temas pri 15 esperantologiaj kaj volapukologiaj broŝuroj en Esperanto kaj en la germana lingvo. Sekvas kun ok libroj du baltaj eldonejoj: “Ryto varpas” el Kaŭno kaj “Sezonoj” el Ka-

liningrado.

La eldonejo de Tomasz Chmielik “Libro-Mondo” avancis UEAon. Ĝi estas la plej aktiva libroproduktanto en Esperantujo dum la lastaj 15 jaroj. Oni vidas, ke nur kvin eldonejoj aperigas averaĝe almenaŭ unu libron ĉiusezone.

Eldonitaj libroj (1991-2005)

Libro-Mondo (Pollando)	114 libroj
UEA (Nederlando)	106 libroj
FEL (Belgio)	75 libroj
Fonto (Brazilo)	71 libroj
Sezonoj (Ruslando)	62 libroj
Arizona Stelo (Usono)	52 libroj
ĈEE (Ĉinio)	51 libroj
Bero (Usono/Nederlando)	48 libroj
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	46 libroj
Impeto (Ruslando)	44 libroj

Ĉi tiu tabelo estas unu el pluraj, kiuj aperis en la tradicia statistika revuo en “La Ondo de Esperanto” 2006, n-ro 2. Ĝi estas legebla ankaŭ en la retejo <http://www.esperanto.org/Ondo/> en la rubriko “Novajoj”.

Halina Gorecka, Aleksander Korjenkov, laŭ „Ret-Info“

Svislando

Malgranda lando plej aktiva

Se oni konsideras ke aktivecoj en landoj dependas de la grandeco de la loĝantaro, oni konstatas, ke la eldonado en Esperanto estas plej forta en la malgrandaj landoj. La Esperanto-eldonado en Litovio ekzemple estas pli ol 100-foje pli forta ol en Usono, en Svislando eĉ preskaŭ 150-foje pli.

m.l. = milionoj da loĝantoj

p./m.l. = paĝoj po miliono da loĝantoj

Lando	m.l.	paĝoj	p./m.l.
Svislando	7	5498	734
Litovio	4	1910	531
Pollando	39	5882	153
Ĉeĥio	10	1163	114
Nederlando	17	1886	113
Belgio	10	915	88
Francio	63	2434	39
Ruslando	143	2638	18
Germanio	82	1202	15
Usono	300	1581	5

laŭ “La Ondo de Esperanto” 2006/2 kaj propraj kalkuloj, red.